

Martin Luther,  
De la ĉielo venas mi

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1.) “De la ĉielo venas mi,  
rakonti volas mi al vi  
pri ege bona, nova aĵ’;  
jen estas mia raportaĵ’.

2.) Hodiaŭ naskis virgulin’  
infanon, kiu savos vin.  
ĝi estas fil’ de nia Di’,  
ĝojeju vi pro tiu ĉi!

3.) ĝi estas Kristo, nia Di’,  
el la mizer’ vin gvidos Li.  
Li volas esti la Savant’,  
de viaj pekoj purigant’.

4.) Alportas feliĉegon ĝi  
al vi de l’ patro, nia Di’,  
ke vivu vi en la ĉiel’  
kun ni en la eterna hel’.

5.) La signon memorigu vi:  
En stala trogo kuŝas ĝi,  
troviĝas tie la infan’,  
tenanta ĉion en la man’.”

6.) Eniru ĝoje ĉiuj ni  
kun la paŝistoj tien ĉi,  
por vidi, kion donis Di’  
per Sia filo nun al ni.

7.) Atentu vi, ho mia kor’,  
rigardu tiun en ador’.  
Jen kuŝas nude en troget’  
la ege kara Jesuet’.

8.) Jesu’, mi bonvenigas Vin,  
ĉar Vi ne malakceptas min,  
vizitas mizerulon min;  
aĥ, kiel mi nur danku Vin.

...

9.) Sinjor', de ĉiu aĵ' kreul',  
aĥ, kia iĝis Vi etul'!  
Vi kuŝas sur la fojno jen,  
de kiu manĝis la azen'!

10.) Se estus tiu mondo pli  
grandega ol nun estas ĝi,  
malvastus tamen ĝi por Vi,  
samkiel tiu trogo ĉi!

11.) Ne per silkvesto kaj velur',  
vestita eatas vi ja nur  
per vindaĵoj; sed en tiuj ĉi  
aspektas kiel reĝo Vi.

12.) Plaĉinta estas ja al Vi,  
elmontri tiel nun al ni,  
ke antaŭ vi de l' mondo or'  
ja estas tute sen valor'.

13.) Ho, mia kara Jesuet',  
farita estu la litet'  
por Vi en mia kora ŝrank';  
mi ne forgesu vin pro dank'.

14.) Pro tio ĝoje saltu mi  
kaj kantu laŭ la melodi'  
de laŭdokant al Via glor',  
ho mia kara Di-Sinjor'!

15.) Honor' kaj laŭd' al nia Di',  
ĉar Sian filon donis Li  
al ni surtera la homar'.  
Ni ĝoju kun la anĝelar'!

...

*Traduko de la Germana poemo "Vom Himmel hoch, da komm ich her" de MARTIN LUTHER (\*1483 – †1546) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-483-940 (2008-12-27 15:47:22)*

*En la katolika preĝo- kaj kantlibro de la episkopejo Monastero/Vestfalia (MÜNSTER / WESTFALEN), Germanujo, estas antaŭmetita kiel la unua strofo enkonduka strofo, kiu klarigas, ke la sekvaj kvin strofoj estas la parolo de la anĝelo, kiu anoncas al la paŝtistoj la naskiĝon de Jesuo. Jen la Esperantigo de tiu enkonduka strofo:*

*0.) Jen venis kun miriga klar'  
anĝelo al la paŝtistar';  
sendita estis li de Di'  
kaj jenajn vortojn diris li:*